

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 7 Eberswalde 1984-06-06

Ekspertizo pri la forsta kaj ĉasa fakvortaro de d-ro Ernst Kleemann, Wiesbaden

Ingward Ullrich

Por tasti la taŭgecon resp. fidindecom de la vortaro mi uzis analizan rapid-metadon surbaze de laŭsistema elekto-provo. La vortaro enhavas ĉ. 2900 kapvortojn, el kiuj mi testis 304 terminojn = ĉ. 10,5%

La testitajn tradukitajn terminojn mi klasifikis laŭ la grado de ilia taŭgeco (fidindeco) jene:

- grupo 0 = taŭga plene
 1 = taŭga sad en aliaj vortaroj (pleje en P.I.V.) pli bona, pli trafa
 2 = ebla, sed (iom) duba
 3 = lingve malkorekta (malkorekta vortfarado)
 4 = maladekvata traduko (malkorekta laŭ ideo, tipa germanismo, laŭvorta traduko)
 5 = duobla malkorektaĵo (3 + 4)

La sekvanta tabelo montras la rezulton de la analizo:

grupo	kvanto de terminoj	%
0	116	38,1
1	16	5,3
2	21	6,9
taŭga	153	50,3
3	23	7,6
4	118	38,8
5	10	3,3
maltaŭga	151	49,7
	304	

Malgraŭ ke la vortlistoj estis kontrolitaj de eksperto kiel dipl.-inĝ R. Haferkorn, direktoro de la sekcio "Teknika Vortaro" en la Akademio de Esperanto kaj direktanto de la teknika parto de la P.I.V., la taŭgeckvoto estas nur 50%. Laŭ mi R. Haferkorn, kiel nefakulo en forstaj aferoj, ne povis kompreni la idean kernon de la terminoj (pro manko de difinoj), kaj sekve li ne provis prijuĝi la tutan vortmaterialon.

La vortaro estas revizienda. En sia nuna lingva stato, laŭ mi, ĝi ne estas taŭga por eldonado. Tamen, ĝi certgrade estas helpo por terminologia laboro.

Ni ricevis proponojn rilate necesojn kaj eblecojn popularigi la laboron de nia fakgrupo. Bonvolu skribi al ni viajn konsideradojn. Ni intencas diskuti la aferon dum la SAEST`84en Brno.

K. H. Simon

**Ĉefaj kriterioj por elekto de la proponitaj
E. forstterminoj**

La elektitaj, tradukitaj terminoj estu:

1. korektaj laŭ
 - idea enhavo (adekvata traduko)
 - normo de la vortfarado (lingva korekteco)
 - (stilo)
2. laŭ eble (plej) mallongaj kaj trafaj (geniaj)
3. Oni preferu terminojn jam publikitajn en ekzistantaj vortaroj, en revuoj kaj artikoloj, se tiuj terminoj estas korektaj kaj laŭ ideo kaj lingvo.
4. Oni nur preferu novkreitajn vortojn, se per ili estas atingebla plej alta trafeco kaj tiel oni povas eviti pli longan parafrazon de la nocio.

Pro la nifemo necesa ↗ Pflanzenklasse

Ingward Ullrich

13/5/1984

Kara Karl-Hermann!

Fine, post longa tempo, mi povas sendi al vi miajn proponojn por la terminoj 0259 –0306. Mi konfirmas la ricevon de la vortaro de d-ro E. Kleemann kaj la ricevon de la slipoj por la komisianoj, plie de la listo de difinoj 0001 – 0147. La vortaron de d-ro Kleemann mi ankaŭ ricevis de J. A. Pachter. Do, mi posedas ĝin dufoje. Mi resendos unu ekzempleron al vi. Bedaŭrinde la vortaro de d-ro Kleemann estas tre malsufiĉa (vidu ĉi-kunan ekspertizon, farita de mi).

La elekto de taŭgaj E- forstterminoj el la amaso de proponoj estos peniga kaj tempoabsorba (vidu ĉikune). Mi faros analizon tiamaniere, ke mi sekvantaj grupoj:

- 1 = taŭga, tre trafa, bone trafa
- 2 = lingve malkorekta (laŭ vortfarado), sed post korekto grupo 1
- 3 = taŭga, sed en aliaj vortaroj pli bona, pli trafa
- 4 = ebla, sed malpli trafa aŭ duba
- 5 = lingve malkorekta (laŭ vortfarado, sed eĉ post korekto maltaŭga laŭ grupo 3 aŭ 4
- 6 = malkorekta laŭ ideo (maladekvata traduko)

La elektotajn terminojn mi ĉerpos el la grupoj 1 – 4 laŭ efektiva ekzisto.

Tio estas, laŭ mi, nur antaŭlaboro. Poste nepre necesas buŝa konsiliĝo de la komisianoj por fiksi la definitivajn fakterminojn. Skriba konsiliĝo absorbos tro multe da tempo. Buŝa esprimo de la opinio de ĉiuj komisianoj estus pli favora, ĉar buŝe oni povas pli bone kaj amplekse diri sian opinion kaj oni povus pleje tuj fiksi la definitivajn terminojn

Salutas vin elkore

Bv. saluti vian
Edzinon!

Via
Ingward